

*redaktis: François LO JACOMO (sekretario de la Akademio)
kun kontribuoj de pluraj direktoroj de la Akademio*

NOVAJ AKADEMIANOJ, NOVAJ DIREKTOROJ

Ĉiun trian jaron, la Akademio elektas por naŭjara postenperiodo trionon de sia membraro: en februaro 2025 okazis tia elekto. Kelkaj akademianoj eksiĝis: Tatiana Auderskaja, Jouko Lindstedt, Vilhelmo Lutermano, Georgi Mihalkov (Julian Modest), Barbara Pietrzak kaj Nikolao Gudskov, sed anoncis sin multaj novaj kandidatoj tiel, ke elekti 17 akademianojn el 28 kandidatoj estis malfacile. Vakis 17 postenoj (el 45: 15 ĝis 2034 kaj 2 ĝis 2028) ĉar Erich-Dieter Krause forpasis en 2023 kaj Boris Kolker demisiis pro aĝo. Renato Corsetti, kiu longtempe (ĝis 2019) estis sekretario de la Akademio kaj ankoraŭ vikle defendis "la bonan lingvon" en Aruŝo (Tanzanio), dum la publika kunsido de la Akademio en 109a Universala Kongreso 2024, estis kandidato sed li mortis la 1an de februaro 2025. Pluraj akademianoj partoprenis la funebran ceremonion.

Estis elektitaj 9 novaj akademianoj: Eckhard Bick, CHO Sung Ho, Birke Dockhorn, GONG Xiaofeng (Arko), Abel Montagut, Jorge Rafael (Rafa) Nogueras,

Jukka Pietiläinen, Maria Rosaria (Sara) Spanó kaj José Antonio Vergara. Sama dudeko da lingvoj estas la gepatraj lingvoj de la akademianoj, sed multaj akademianoj kapablas plurajn lingvojn kaj tiu kono de multaj lingvoj helpas en kelkaj lingvaj diskutoj.

En marto 2025 la Akademio (re)elektis sian estraron kaj direktaron. Ne ŝanĝiĝis la estraro: Prezidanto: Probal Dasgupta, Vic-prezidantoj: Bertilo Wennergren kaj Brian Moon, Sekretario: François Lo Jacomo. Kelkaj sekcioj konservis siajn Direktorojn: Ĝenerala vortaro: Jesper Jacobsen, Lingva Konsultejo: Kirilo Brosch, Interkonsilejo: Alexander Shlafer, Prononco: Probal Dasgupta kaj Faka Lingvo: Orlando Raola. Sed novaj direktoroj estis elektitaj por la sekcioj pri: Gramatiko: Alexander Shlafer, Literaturo: Edmund Grimley Evans, Kontrolado de lerniloj: Birke Dockhorn, kaj por la komisionoj pri: Historio de la Akademio: Jorge Rafael Nogueras, Komunikado: Tim Owen.

LA LASTAJ DU DECIDOJ

REZULTSTATAJ ADJEKTIVOJ

En Februaro 2025 la Akademio de Esperanto publikigis decidon pri adjektivoj, kiuj estas derivitaj de verboj kaj kiujn nemalmultaj esperantistoj uzas en neregula signifo. Temas pri adjektivoj kiel *morta*, *korekta*, *komplika*, *ferma*, *malferma* kaj *miksa*, kiuj estas fojfoje uzataj en pure stata signifo, kvankam la verboj, de kiuj ili deriviĝas, esprimas statŝanĝon, tiel ke laŭregule ankaŭ la adjektivoj devus esprimi ian rilaton al tiu statŝanĝo.

Ekzemple, oni fojfoje renkontas uzojn de *korekta* en stata signifo simila al *senerara*, *laŭregula* aŭ *ĝusta*. Sed la radiko *korekt/* estas verba kaj havas signifon similan al *sen/erar/ig/*, tiel ke la regula signifo de *korekta* similas al tiu de *senerariga*, kiel en la *korekta skribilo de la instruisto* (la skribilo, per kiu la instruisto korektas). La antaŭe menciitaj stataj uzoj de *korekta* aliflanke ne sekvas la ĝeneralajn regulojn por derivi adjektivojn de verbaj vortobazoj.

La Akademio enkondukis la terminon *rezultstata adjektivo* por tia uzo de adjektivo, kiu estas derivita de statŝanĝa verbo, sed neregule esprimas signifon similan al la rezulta stato de tiu statŝanĝo.

La Akademio de Esperanto

1. malrekomendas la uzadon de adjektivoj kiel *morta*, *korekta*, *komplika*, *ferma*, *malferma*, *miksa* kaj *veka* en neregula rezultstata senco;

2. atentigas pri tio, ke pro la ofta uzado de *morta*, *korekta* kaj *komplika* en rezultstata signifo estas preferinde konsideri ĉi tiujn vort-uzojn tradiciiĝintaj nekoheraĵoj anstataŭ rekte nomi ilin eraraj;

3. rekomendas, ke al lernantoj de Esperanto oni ne prezentu la rezultstatajn adjektivojn uzatajn en neregula senco kiel ekzemplojn de regula vortfarado; anstataŭe, se oni instruas ilin, oni klarigu ilin kiel esceptojn al la kutimaj reguloj de vortfarado per la finaĵo -a;

4. tute malaprobas la uzon de formoj kiel *korektigi*, *komplikigi* kaj *vekigi* en la sencoj de *korekti*, *kompliki* kaj *veki*.

Krome la Akademio kompilis detalan liston de vere kaj ŝajne statŝanĝaj adjektivoj kune kun rekomendoj kaj malrekomendoj koncerne ilian uzadon kaj eblajn anstataŭigojn.

La plena decido-teksto estas konsultebla en la retejo de la Akademio, <https://akademio-de-esperanto.org/decidoj>

PRI BRNO KAJ GRAZ

Pasintjare, iuj akademianoj rekomendis la esperantigon Burno de la ĉi-jara kongresurbo (nacilingve nomata Brno) kaj konvinkis la Estraron de UEA uzi ĝin. Tamen en tiu okazo, la Akademio kiel institucio ne esprimis sin pri tiu esperantigo. Ĉi-jare, la ĉi-suba teksto estis aprobita de la Akademio per formala voĉdono, en kiu partoprenis 98% el la akademianoj kaj 89% el ili voĉdonis "jes", 2% voĉdonis "ne" kaj 9% sindetenis.

UEA kutimas esperantigi la nomojn de urboj de la Universalaj Kongresoj, do ankaŭ la nomo de Graz, urbo de la 111-a Universala Kongreso (2026), estas esperantiginda. Principojn por esperantigo kaj uzo de neesperantigitaj formoj jam ellaboris la Akademio de Esperanto, i.a. en sia *Rekomendo pri la uzo de personaj nomoj* (2013). Tiu rekomendo estas obeata kaj evoluigata i.a. en la *Deka oficiala aldono al la Universala Vortaro* (2023) kaj en la konsultega respondo pri *Esperanta nomo de la ĉeĥa urbo Brno* (2024).

Konstatinte, ke la esperantigo Graco

estas jam uzata de pluraj jardekoj (1), la Akademio opinias, ke tiu formo estas la plej akceptebla esperantigo de tiu urbonomo, kaj rekomendas uzi tiun ĉi formon en dokumentoj rilataj al la kongreso. Kompreneble, en okazo de specifa bezono, la esperantigita formo povas aperi apud la nacilingva.
--

(1) Oni trovas la formon Graco interalie en la revuo *Bulgario* (1964), la Jarlibro de UEA (1974, 1975, 1977), *Internacia Fervojisto* (1989), *Internacia Pedagogia Revuo* (1998), *Esperanto Aktuell* (2017) kaj *Fervojfakaj Kajeroj* (2019)

KONFERENCO KAJ LAŬRO

Krom per partopreno en Universala Kongreso kaj Virtuala Kongreso, la Akademio videblas per sia Konferenco de la Akademio: kvaran fojon tiu ĉi okazis, rete, la 16an kaj 17an de decembro 2024. La prelegoj (ankaŭ de la antaŭaj jaroj) daŭre videblas en la retejo <https://akademio-de-esperanto.org/konferencoj>.

En 2024 ne estis aljuĝita la premio: Laŭro de la Akademio. En 2025, post la elekto de la direktoraro, la Akademio elektis novan ĵurion de tiu ĉi premio: Edmund Grimley Evans (prezidanto), Javier Alcalde Villacampa, CHO Sung Ho, Jesper Jacobsen, Valentin Melnikov, Carlo Minnaja kaj Jorge Rafael Nogueras. Pli ol dek libroj kandidatas por la premio aljuĝota meze de decembro.

LABORADAS LA SEKCIOJ...

SEKCIO PRI ĜENERALA VORTARO

Ekde julio 2022, sub gvidado de Jesper Lykke Jacobsen, la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro laboras pri la Akademia Vortaro.

La unua etapo en tiu laborprogramo estis la pritrakto de grupo de vortoj, kiu konsistas ĉefe el geografiaj nomoj kaj nomoj de malsamaj popoloj. La debato

en la Sekcio pri tiuj vortoj finiĝis en marto 2023 kaj la Pleno voĉdone aprobis la rezultan dokumenton la 24an de septembro 2023, en la formo de *Deka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro*. Per tiu Oficiala Aldono la Akademio de Esperanto oficialigis 420 radikojn kaj 832 vortojn aŭ plurvortajn terminojn. La plena dokumento kun antaŭparolo estas konsultebla ĉe <https://www.akademio-de-esperanto.org/decidoj/10oa.html>

Jam en la sama tago de tiu aprobo la Sekcio komencis labori cele al venonta *Dekunua Oficiala Aldono*. Ties enhavo celas esti ĉefe tre kutimaj, vaste uzataj, sed ankoraŭ ne oficialigitaj vortoj, kiuj ĝenerale rilatas al neniu specifa fako aŭ temo, kun kelkaj esceptoj por tre komunaj vortoj, kiuj ja apartenas al pli specifa, sed ne aparte fakeca temo. La difinotekstojn ilustras abunda ekzemplo-materialo ĉerpita el publikigitaj tekstoj.

La sekcio laboras laŭ alfabeto vicordo. En julio 2025 ĝi atingis la literon K post interŝanĝo de pli ol 6000 mesaĝoj en la sekcia diskutforumo. Entute 94 radikoj estas nun voĉdone aprobitaj de la Sekcio kaj aperos en la dokumento, kiun ĝi transdonos al la Pleno post la trakuro de la tuta alfabeto kaj posta homogeniga kaj

kvalitkontrola fazo. Estas ankoraŭ tro frue por diri, ĉu el tiu rezultos Akademia Decido.

LINGVA KONSULTEJO

Inter julio 2024 kaj julio 2025 la Lingva Konsultejo traktis ĉiujn ses demandojn starigitajn de esperantistoj. Tri el la respondoj koncernis akordon: en apozi-cioj, kiel predikativo kaj kiel komplemento de "aspekti". La aliaj demandoj koncernis prepozicion por mezuroj, kiuj specifas esprimojn kun "po", la metaforan uzon de "sifoni" kaj la esperantigon "Alzaco". Ĉiuj respondoj estas troveblaj en la retejo <https://www.akademio-de-esperanto.org/>

AKADEMIANOJ AKTIVAS...

Restas tro malmulte da spaco por menciĝi ĉiujn personajn kontribuojn de akademianoj al la kulturo de Esperanto, sed jen ege koncize kelkaj ekzemploj:

La Akademio partneras kun UEA pri C2-nivela KER-ekzameno: tiucela laborgrupo (**Marc van Oostendorp**, **Grant Goodall**, **Duncan Charters** kaj aliaj) kunlaboras kun Katalin Kovats interalie kiel ekzamenantoj.

Ahmad Reza Mamduhi estas la prezidanto de la 4a Interkultura Novelo-Konkurso (INK)

Amri Wandel kunverkis kvar sciencajn librojn: *Astronomio kaj astrofiziko por ĉiuj*, *Spacvojaĝado kaj esplorado*, *IKU-libro* kaj *Vivo en la spaco...* Li iniciatis novan premion Charles Power por sciencaj prelegoj.

Probal Dasgupta, **François Lo Jacomo** kaj **Marc van Oostendorp** verkis ĉapitrojn de aperonta libro *Approaches to Interlinguistics and Esperanto Studies* (redaktas Ilona Koutny kaj Nicolau Dols).

Anna Lowenstein plu redaktas kaj riĉigas la facillingvan retejon <https://uea.facila.org/>, organizas la Movadan Foiron kaj daŭrigas la laboron de forpasinta Renato Corsetti pri la bona lingvo.

A. Giridhar RAO eldonis rete esperantigon de la aŭtobiografio de Gandhi kaj prelegis plurforume kaj plurlingve pri lingva diverseco, biodiverseco kaj edukado.

BAK Giwan (Amondo) verkis libron *Rakonta Historio de Ĉinio*, eldonis *Eksprese al la Korea*. Li rete instruas ĉe Zaozhuang Universitato (Ĉinio) kaj dekfoje prelegis pri Esperanto kaj pri Koreio.

Kirilo Brosch daŭrigas sian prozan tradukadon de *Iliado* de Homero. Ĝis nun li tradukis ĉ. du trionojn de la poemo kaj planas komenci la versan version venontjare.

Carlo Minnaja verkas kaj tradukas en pluraj revuoj, kaj tradukis *Unu neniu kaj cent mil* de Luigi Pirandello,

Jorge Rafael (Rafa) Nogueras, nia retejestro, instruas, prelegas kaj eldonis mikronovelon *Centvorte*.

Abel Montagut verkis: Pri esperantigo de virinaj nomoj, precipe tiuj el la antikva greka... (*Beletra Almanako*)